## Babilada rondo

… okazos je la 19-a, vendrede …

**la 11-an de septembro**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
av. Nestlé 9, 1800 Vevey
021 922 34 74 / 079 292 32 63

**la 2-an de oktobro**
ĉe M.-Antoinette kaj Knud Sunier
Av. des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56 / 079 210 97 75

Ne forgesu aliĝi ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd#

kaj por la bazaro en Laŭzano, ĉe:
http://doodle.com/fbzxwameyqwivvhz

## Penso

Sukceso postulas felican mensan disponon. Neniu negativa penso devas kontraŭi vian deziron de sukceso.

## Por rideti

S-ino Kretpolv, la instruistino, plendas antaŭ la klaso: - *Mi estas ĝenata de la kvanto de hejmtaskoj rekte kopiitaj de interreto.*
Ĉiuj infanoj mienas senkulpe.
S-ino Kretpolv: - *Ĉu iu el vi scias, kio estas "plagiato"?*
Eta Joĉjo levas manon: - *Jes, sinjorino. Ĝi estas malsukcesinta ŝtelo.*
S-ino Kretpolv: - *Ho, knabo, tio ja estas cinika difino.*
Joĉjo: *Mi trovis ĝin en interreto.*


## Laŭzana Esperanto – Societo

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
**www.facebook.com/societedesperanto.lausanne**
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


**Laŭzana Esperanto-Societo**

# Informilo

Septembro 2015 – n° 7

Lunde, la 7-an de septembro je la 20-a
**ĉe "Espace Dickens"**
avenue Charles-Dickens 4, Lausanne
**Prelego de Dietrich Weidmann,**
kunprezidanto de SES, kiu parolos al ni pri UEA, la svisa societo kaj la lokaj kluboj.

**Dimanĉe la 4-an de oktobro**
*Manuel Rovere gvidos, je la 10-a, atelieron pri kanto kaj je la 15-a, kantos karaokee kun la laŭzana publiko.*

**Lunde la 5-an de oktobro**
*Manuel prelegos pri sia profesio kiel verkisto, kantisto kaj muzikisto.*

**Inter la 27-a de okt. kaj la 7-a de nov.:**
**EKSPOZICIO EN LA PALUD**

**Lunde la 2-an de novembro**
*Karlota kaj la laŭzanaj kongresanoj parolos pri la 100-a UK en Lillo.*

**Sabate la 19-an de decembro**
*Zamenhofa festo*

# Jara ekskurso en la vaŭda nordo

Sabate la 27an de junio 2015 14 membroj de LES partoprenis la jaran ekskurson kutiman. Ĉi-jare, dank'al la organizo de Marie-Antoinette kaj Knud Sunier, la ĉeestantoj vizitis la "Baud"-an Muzeon en *l'Auberson* kaj la areon de *Clendy* en *Yverdon-les-Bains*.

La muzeo estis fondita de la fratoj Frédy, Roberto kaj Auguste Baud en 1955. Ĝi kunigas aŭtomataĵojn kreitajn inter 1750 kaj 1940. La muzea domo konsistas je du grandaj ĉambroj kaj la enirejo kiel vendejo.



En la unua ĉambro ni malkovras muzikskatolojn, horloĝojn, kantobirdajn mekanikaĵojn, moviĝantajn pentraĵojn, gramofonojn kaj malgrandajn objektojn kun multaj akcesoraĵoj: memoraĵoj de la malnova epoko.

En la 2a ĉambro ni povas admiri kaj aŭskulti grandajn mekanikajn muzikajn instrumentojn, ununurajn pecojn grandvalorajn. Inter la plej prestiĝaj troviĝas la grandega orgeno foira datita de 1900: unue, la orkestrilo kun dek malsamaj instrumentoj, due, la "fama Maestro grandioza", trie kaj fine la "Phonolistz Violiona", kiu ludas pianon kaj violonon... kaj multaj aliaj fascinaj malkovroj pli interesaj la unuaj ol la aliaj. La vizito daŭris pli ol unu horo kaj ni ĝuis la detalajn klarigojn kiel multajn historiajn informojn donitajn de la estro de la muzeo.

Poste ni festis la naskiĝtagon de Pietro per ŝaŭmvino kaj aperitivaĵoj antaŭ ol iri al *Yverdon-les-Bains*. Ni manĝis en la centro de "Natura PRO" en *Champ-Pittet*. La loko ege belas kaj la nutraĵoj bone kvalitas.

Post la manĝo ni kune iris al la areo de *Clendy*. Tiu tereno enhavas 45 statuojn, menhirojn devenajn de la megalita periodo. La unuaj ŝtonblokoj estis identigitaj unuafoje en 1878 en strando de la Lago de Neŭŝatelo: ili aperis dum la unua korekto de la Ĵurasaj akvoj. La monumentejo de *Clendy* (renovigita en 1986) enhavas geometriajn aŭ preskaŭ homajn formojn inter 35cm kaj 4.50m. La menhiroj estas aranĝitaj en du vicoj je 50m longe kaj laŭ kvar samdistancaj grupoj formante sorton de duoncirklo.



La loko, videbla de malproksime en la pratempo, verŝajne funkciis kiel grava kunvenejo soci-religia. La menhiraj statuoj homformaj eble prezentas diojn, heroojn aŭ prapatrojn, kiuj estis honorigitaj de la komunumoj ĉirkaŭe.

Ĉiuj el ni dankegas la organizantojn, kiuj permesis al ni malkovri tiujn ambaŭajn belegajn vizitlokojn kaj – tute speciale – pro la amika etoso en bona kunularo.

Rosario

Trovu la 5 erarojn

